Bulteno de la Londona Esperanto-Klubo

www.espinfo.org/lek

Julio - aŭgusto 2021

Kluba programo:

Julio:

2. **Vasil Kadifeli** : Prezento de la revuo Turka Stelo.

9. **Paul Peeraerts** kaj **Bart Demeyere**: Retbutiko de FEL, historio kaj nuntempa funkciado.

16. **Paulo Viana**: Kion vi scias pri Amazonio?

23. Klubo fermita. Neniu ZOOM-kunveno pro la Virtuala Kongreso de UEA.

30. **Ivo Durwael**: La ideoj de Hannah Arendt. Ĉu eble inspiraj por la Esperanto-komunumo?

Aŭgusto:

6. **Terry Page**: Kiel (kaj kial) oni sonorigas en Britujo.

13. **Maurizio Giacometto**: Bilda 'ekskurso' al Torino, urbo de la UK en 2023.

20. **Tim Owen**: Novaj eldonaĵoj de Esperanto-Asocio de Britio.

27. **John Wells**: Lingva seminario.

Loko, horaro kaj aliaj informoj:

Ni kunvenas vendredvespere. Dum la kronvirusa krizo, kunvenoj okazas per la reta sistemo Zoom, komenciĝante je 19h (UTC+1). Kunvenoj ĉe Old Diorama Arts Centre ankoraŭ ne povas okazi. Eble ili rekomenciĝos iam en la malfrua somero. Novaj spektuntoj bonvolu peti ligilon al proksim-vendreda Zoom-renkontiĝo de **lek.sekretario@gmail.com**. Haveblas ankaŭ, ĉe Jutubo, registraĵoj de prezentoj jam okazintaj. Vizitu **espinfo.org/lekrano**

Leteroj de la konsilantaro

Mesaĝo de la prezidanto:

Karaj klubanoj,
Ni ĵus havis novan sperton: jarkuvenon en *Zoom*. Dankon al ĉiuj partoprenintoj kaj al Matt pro la lerta gvidado.
Ni havis multajn novajn spertojn dum la pasinta nekutima jaro de la pandemio. La komitato kontaktis spertajn esperantistojn tutmonde kaj ni ĝuis multajn interesajn prezentojn. Grandan dankon al ĉiuj, kiuj laboris pri la programo kaj tenis la kluban vivon vigla kaj seninterrompa.
Vi ankaŭ elektis min nova prezidanto de LEK. Dankon.
Permesu dividi kun vi kelkajn personajn rememorojn. Mi venis en Brition en 1988 kaj tuj iĝis membro de loka klubo (poste konata kiel Esperanto-Societo de Berkshire) sub gvidado de neforgesebla Mervyn Jackson. La klubo ne havis propran sidejon kaj ni renkontiĝis unufoje monate - en domoj aŭ loĝejoj de la klubanoj. Okazadis bonegaj someraj kunvenoj en la ĝardeno de Mervyn en Bracknell, aŭtunaj festadoj ĉe la lignofajro en la ĝardeno de la familio de Heleno kaj Ian Fantom (kaj iliaj tri talentegaj infanoj!) en Newbury, en la domo kaj ĝardeneto de Mark Palmer en Reading, en la subĉiela (je la 17-a etaĝo) loĝejo de poeto kaj tradukisto Kris Long en Bracknell, muzikaj vesperoj en la domo de Nigel kaj Wendy Atkinson. Bonegaj rememoroj pri tiuj jaroj!

Mi translokiĝis en Londonon en 2000 kaj tuj iĝis membro de LEK. Dum mia membreco la klubo translokiĝis kelkfoje: de Drummond Street (longdaŭra sidejo) al *YMCA* apud metrostacio Tottenham Court Road, poste al Irlanda Kultura Centro en *Camden* kaj poste al nuna *Diorama*. Dum jaroj mi admiris la laboron de LEK-estraro, dum kelkaj jaroj mi estis unu el la vicprezidantoj. El la prezidantinoj daŭre restas en la koro kara ridetanta Nora Brown. Eternan memoron al ŝi!
En mia vivo mi provis sekvi la konsilon de mia ŝatata ukraina filozofo *Skovoroda* (kaj certe de antikvaj filozofoj): "Ekkonu vin mem kaj vivu agorde al via naturo". En mia karaktero ĉefas helpi aliajn - ne gvidi. Tial mi tre ĝuis mian 24-jaran laboron en la Brita Biblioteko: pligrandigi la kolektojn (inter ili la Esperantan), katalogi librojn kaj tiel fari ilin alireblaj al legantoj, helpi al seriozaj esploristoj fosi pli profunde.
Mi do provos gvidi vin - esperante ke iu "natura gvidanto" jam baldaŭ prezentos sin al ĉi tiu grava posteno. Tiam mi feliĉe reiros al mia natura rolo de helpanto-konsilanto.
Multaj gravaj taskoj atendas la novan estraron. Al la laboro do, karaj samideanoj!

Amike, Olga

Olga Kerziouk

EAB eldonas

Ĉu vi scias ke Esperanto-Asocio de Britio nuntempe estas tre aktiva en la eldonado de libroj en Esperanto? La plejmulto el ili estas tradukaĵoj sed estas ankaŭ kelkaj originale verkitaj en nia lingvo. Se vi ne jam scias, vi trovos ilin ĉe ***esperanto.org.uk***.

Rekomencis la novan eldon-epokon ***La Krubalo***, kiu pasintjare estis aljuĝita 'Infanlibro de la jaro' en la Belartaj Konkursoj de UEA.

Sekvis post kelkaj monatoj ***Spaco sur la balail'***, rakonto pri afabla sorĉistino kaj ŝia kato kaj iliaj vojaĝoj. La libron, unue verkita en la angla, oni tradukis en multajn lingvojn, inkluzive de Esperanto.

EAB lastatempe anoncis sian plej novan eldonaĵon: la infanlibron ***La plej eleganta giganto de la urbo***. Verkis ĝin Julia Donaldson, la sama fama aŭtoro de *La Krubalo*, kaj tradukis ĝin Ian Carter kaj Edmund Grimley Evans. Ĝi sekvas la sukcesan formulon de la aliaj du: buntaj paĝoj, belaj bildoj, spritaj rakonto kaj lingvo. La libro estas disponebla kontraŭ nur kvin pundoj ĉe la libroservo de EAB.

Alia interesa novaĵo estas la reeldono de la novelaro ***Okuloj***, verkita de Marjorie Boulton antaŭ pli ol kvindek jaroj kaj nun havebla en novaj koloroj kaj nova kovrilo. Tri el la noveloj en ĉi tiu kolekto ricevis premion en la Belartaj Konkursoj de UEA.

Eble la plej granda novaĵo estas la baldaŭa eldono de la longe atendita dua libro pri Winnie-la-Pu. ***La domo ĉe Pu-Angulo*** alportos nin denove en la mondon de la ĉarma urseto nomata Pu kaj de liaj amikoj de la Centakrea Arbaro. La libro, kiun tradukis Edmund Grimley Evans, havas belan malmolan kovrilon kaj ĝin ornamas la famaj desegnaĵoj de E. H. Shepard.

EAB planas daŭrigi la tradukadon kaj eldonadon de tiaj porinfanaj sed ne nur porinfanaj libroj. Do, daŭre vizitu la retejon.

Multaj aliaj libroj haveblas ĉe EAB. Inter ili, ni menciu: ***Perlo***, ***La Eta Muso en Bretonio***, ***La aventuroj de sinjoro Bruetulo*** kaj ***Adelfjo Musdetektivo***. Sed, estas multe pli ol la ĉi tie listigitaj libroj. Do, ne hezitu: kontrolu vi mem ĉe ***esperanto.org.uk****/store/category/1-libroj/*

Maurizio 'Rico' Giacometto

Londona Esperanto-Klubo

Funkciuloj

Honora Prezidanto: Prof. John Wells;
Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.
Konsilantaro: Olga Kerziouk (Prezidanto), Anthony Bodineau (Vicprezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson, Phil Housley, Terry Page. Maurizio Giacometto (Kompilisto de la Bulteno).

Enigmoj

Deko da... Fiŝoj!

			i	s	b	o			
		u	t	u	r	T	j		
	f	ŝ	s	e	t	a	l	P	
z	ĥ	H	a	r	i	n	g	e	c
k	a	v	n	ŭ	S	i	g	l	h
s	u	n	i	T	k	f	ĉ	o	ĵ
m	e	l	d	p	o	e	d	S	ĝ
	M	o	r	u	m	l	a	S	
		r	a	n	b	g	t		
			S	d	r	E			



Kion fari: Serĉu 10 radikojn kiuj nomas **fiŝon**. Ili povas aperi vertikale aŭ horizontale, en ordo normala aŭ inversa, sed ne diagonale. Ĉiu radiko komenciĝas per litero majuskla, ceteraj literoj estas senescepte minusklaj.
Por kontroli ĝustecon de radikoj kiujn vi trovis, skribu ĉiun en la suban ĉelaron. La nombro da vakaj ĉeloj, kaj iuj vokaloj jam presitaj, malebligas tion erare fari. La 10 literoj en la unika kompleta kolumno de la plenigenda ĉelaro nomas **ion netuŝendan**.

Solvo de la enigmo en la antaŭa bulteno

La eminenta ĵurnalisto trovenda en la antaŭa enigmo estas **Stefan Maul**. La dek legomoj estis BRASIK, KAROT, CEP, FAB, SPINAC, PASTINAK, TERPOM, ASPARAG, KUKURB, FAZEOL. Solvo: STEFAN MAUL.